

S
21
C
7257

C.1

Dogmoj

de

Helelismo.



Aparta depreso el la № 1 de «Ruslanda
Esperantisto».



La unua presejo esperantista en Rusujo, St.-Peterburgo,
Troickij prospekt, 14, D. P. Vejsbrut.

1906.

הספריה הלאומית

S 21 C 7257

Zamenhof, Ludwik Lazar,
Dogmoj de hilelismo /

C.1



2189942-10

W-X

ספריה

ציון הלאומי

חברת

דורשי האוניברסיטה העברית בירושלם

ורשה

נדבת


עו"ד בוריס סטבסקי

ורשה

שנת תרפ"ו

16119

מספר



Dogmoj

de

Ĥilelismo.



Aparta depreso el la № 1 de «Ruslanda
Esperantisto».



La unua presejo esperantista en Rusujo, St.-Peterburgo,
Troickij prospekt, 14, D. P. Vejsbrut.

1906.

Догматы Гиллелизма.

Редакція „*Ruslanda Esperantisto*“ получила отъ перваго кружка Гиллелистовъ слѣдующее письмо, которое и помѣстило въ № 1 1906 года.

Безпрестанная взаимная борьба различныхъ племенъ и религій въ обширномъ Россійскомъ государствѣ, вопіющія несправедливости и насилія, которыя ежедневно и на каждомъ шагу совершаются большинствомъ населенія надъ меньшинствомъ, не смотря на то, что послѣднее имѣетъ такое же нравственное право на свою естественную родину, какъ и первое, положительныя стремленія однихъ народовъ въ отношеніи къ другимъ во всѣхъ углахъ ихъ общаго отечества, — все это давно уже побуждало многихъ искать какой нибудь нейтральной почвы, на которой люди различныхъ народностей и религій — по крайней мѣрѣ всѣ сыны одного и того же отечества — могли бы сходиться между собою мирно и братски, безъ взаимныхъ столкновеній, ненависти и несправедливости. Эту именно нейтральную почву представляютъ собою изложенные ниже догматы „Гиллелизма“.

S21 V7 257

170.6

ZAM (DO)

Dogmoj de Hilelismo.

La Redakcio de „Ruslanda Esperantisto“ ricevis de la unua rondeto Hilelista la sekvantan leteron, kiu estis publikigita en la № 1 de 1906 jaro.

La senĉesa reciproka batalado de la diversaj gentoj kaj religioj en la vasta Rusuja regno, la kriantaj maljustaĵoj kaj perfortaĵoj, kiuj ĉiutage kaj sur ĉiu paŝo estas farataj de la plimulto de loĝantaro kontraŭ la malplimulto, malgraŭ ke tiu-ĉi lasta havas tian saman moralan rajton pri sia natura patrujo, kiel la unua, la englutema celado de unuj popoloj kontraŭ aliaj, en ĉiuj anguloj de ilia komuna patrujo,—ĉio tio-ĉi jam longe devigis multajn serĉi ian neŭtralan fundamenton, sur kiu homoj de malsamaj gentoj kaj religioj — almenaŭ ĉiuj filoj de sama patrujo — povus komuniĝadi inter si pace kaj frate, sen reciprokaj kolizioj, malamo kaj maljusteco. Tiun ĉi neŭtralan fundamenton prezentas la mal-supre donitaj dogmoj de la „Hilelismo“.

Основная идея Гиллелизма возникла лѣтъ 10 тому назадъ, но имѣла нѣсколько иной характеръ и назначена была сначала специально только для одной человѣческой группы, для регулировки отношеній этой группы къ окружающему міру; только впоследствии она приняла характеръ абсолютной, не зависящей ни отъ какихъ племенныхъ или религіозныхъ особенностей, какъ единственно справедливая регулировка взаимныхъ отношеній между всѣми племенами и религіями. Долгое время однако инициаторы этой идеи не рѣшались вполне точно формулировать свои догматы изъ опасенія, что то, что въ теоріи казалось хорошимъ, можетъ быть на практикѣ окажется неисполнимымъ.

Но въ концѣ истекшаго лѣта произошло нѣчто такое, что уничтожило всякія сомнѣнія. Въ августѣ 1905 года во французскомъ городѣ Boulogne-sur-Mer состоялся первый всемірный конгрессъ эсперантистовъ, успѣхъ котораго превзошелъ всякія ожиданія. Больше тысячи человѣкъ, пріѣхавшихъ изъ самыхъ различныхъ странъ всего міра и принадлежащихъ къ 22 различнымъ народностямъ и къ самымъ различнымъ религіямъ и философскимъ системамъ, въ теченіе цѣлой недѣли жили вмѣстѣ въ самой искренней дружбѣ и братствѣ, говорили между собою исключительно на нейтральномъ международномъ языкѣ, исповѣдывали религіозные принципы исключительно нейтрально - человѣческіе. Кто слышалъ многочисленныя рѣчи и дебаты

La principa ideo de la Hilelismo naskiĝis antaŭ dek jaroj, sed ĝi havis iom alian karakteron kaj estis destinita tiam speciale por unu homa grupo, por reguligi la rilatojn de tiu-ĉi grupo al la ĉirkaŭanta mondo: nur poste ĝi akceptis karakteron absolute, sendependan de ĉiuj gentaj kaj religiaj apartecoj, kiel sole justa reguligo de la reciprokaj rilatoj inter ĉiuj gentoj kaj religioj. Tamen longan tempon la iniciatoroj de tiu ideo ne kuraĝis precize formuli siajn dogmojn, timante, ke tio, kio teorie ŝajnis bona, en la praktiko eble montriĝos neplenumebla.

Sed en la fino de la pasinta somero okazis io, kio neniigis ĉiujn dubojn. En Aŭgusto 1905 en la franca urbo Boulogne-sur-Mer havis lokon la unua tutmonda kongreso de esperantistoj, kies sukceso superis ĉiujn atendojn. Pli ol mil homoj, kiuj alveturis el la plej diversaj landoj de la tuta mondo kaj apartenis al 22 diversaj popoloj kaj al la plej diversaj religioj kaj filozofiaj sistemoj, en la daŭro de tuta semajno vivis kune en la plej sincera amikeco kaj frateco, parolis inter si ekskluzive nur en neŭtrala internacia lingvo, konfesis religiajn principojn nur neŭtrale-homajn. Kiu aŭdis la multenombrajn parolojn kaj diskutojn en la vasta kaj plenigita konstruaĵo de la kongreso, kiu ĉeestis en la teatraj prezentadoj, en kiuj la aŭskultantoj kaj plerumantoj prezentis per si miksaĵon de ĉiuj gentoj kaj popoloj, kiu

въ обширномъ и переполненномъ зданіи конгресса, кто присутствовалъ на театральныхъ представленіяхъ, въ которыхъ слушатели и исполнители представляли смѣсь всѣхъ племенъ и народовъ, кто видѣлъ ту полнѣйшую непринужденность и то трогательное братство, которое царило между всѣми участниками конгресса, тотъ самъ себѣ не вѣрилъ, что всѣ эти люди еще вчера были совершенно чужды другъ другу, что ихъ объединилъ только нейтральный языкъ и что тѣ нѣсколько недѣль, которыя каждый изъ нихъ посвятилъ на изученіе баснословно легкаго нейтральнаго языка, совершили чудо и, не отрывая никого отъ его натуральной родины, языка или религіи, дали людямъ самыхъ различныхъ народностей и религій возможность жить между собою въ самомъ мирномъ и искреннемъ братствѣ.

Поразительный успѣхъ Булонскаго конгресса убѣдилъ инициаторовъ Гиллелизма, что абсолютная справедливость, равенство и братство между народами на практикѣ вполне возможны. Поэтому они рѣшили воспользоваться ближайшимъ всемірнымъ конгрессомъ эсперантистовъ въ Женевѣ въ сентябрѣ 1906 года, чтобы предложить всѣмъ друзьямъ междуплеменной справедливости соединиться въ общую группу, которая среди друзей международного языка составляла бы секцію *).

*) Не слѣдуетъ смѣшивать Гиллелизма съ Эсперантизмомъ! Обѣ идеи очень родственны между собою, но нисколько не идентичны. Можно быть отличнымъ эсперантистомъ и, однако, противникомъ Гиллелизма.

vidis tiun plenan senĝenecon kaj tiun kortu-
 ŝantan fratecon, kiu regis inter ĉiuj partopre-
 nantoj de la kongreso, tiu al si mem ne kredis,
 ke ĉiuj tiuj homoj ankoraŭ hieraŭ estis tute
 fremdaj unuj al la aliaj, ke ilin unuigis nur
 neŭtrala lingvo kaj ke tiuj kelkaj semajnoj,
 kiujn ĉiu el ili dediĉis por la lernado de la
 fable facila neŭtrala lingvo, faris miraklon kaj,
 deŝirante neniun de lia natura patrujo, lingvo
 aŭ religio, donis al homoj de plej diversaj
 gentoj kaj religioj la eblon vivi inter si en la
 plej paca kaj sincera frateco.

La mirinda sukceso de la Bulonja kon-
 greso konvinkis la iniciatorojn de la Hilelismo,
 ke absoluta justeco, egaleco kaj frateco inter
 la popoloj en la praktiko estas plene ebla.
 Tial ili decidis uzi la plej proksiman tutmon-
 dan kongreson de la esperantistoj en Ĝenevo
 en Septembro 1906, por proponi al ĉiuj ami-
 koj de interpopola justeco unuiĝi en apartan
 grupon, kiu inter la amikoj de internacia lin-
 gvo prezentis apartan sekcion*).

*) Oni ne devas intermiksi la Hilelismon kun la
 Esperantismo! Ambaŭ ideoj estas tre parencaj inter
 si, sed tute ne identaj. Oni povas esti bonega esperan-
 tisto kaj tamen kontraŭulo de la Hilelismo.

Но текущія событія въ отечествѣ первыхъ Гиллелистовъ заставляютъ ихъ выступить со своимъ проектомъ значительно раньше, чѣмъ они намѣревались. Теперь, когда все у насъ пробуждается къ новой жизни, когда общественная совѣсть начинаетъ заявлять о своемъ существованіи, когда есть надежда, что вмѣсто притѣсняющихъ и притѣсняемыхъ мы, можемъ быть, будемъ имѣть „людей“ и „гражданъ“ — теперь намъ болѣе, чѣмъ какой либо иной націи необходимо установленіе опредѣленныхъ политическо-религіозныхъ догматовъ, которые добыли бы возможность каждому гражданину нашего разночленного отечества жить въ полномъ мирѣ со всѣми другими гражданами, не навязывая имъ кулачною силою своихъ чисто семейныхъ идеаловъ. Въ настоящую критическую минуту, когда нашему отечеству нужны всѣ его силы, необходимо введеніе въ жизнь такихъ догматовъ, которые позволили бы всѣмъ разноплеменнымъ и разновѣрнымъ гражданамъ прекратить свои взаимные раздоры и счеты и искренно объединиться для спасенія общаго нашего отечества, которое должно, разумѣется, стать наконецъ принадлежностью всѣхъ своихъ гражданъ, а не одного только племени и религіи. Хотя огромное большинство нашихъ согражданъ совершенно еще не подготовлено для нашей идеи и голосъ нашъ останется гласомъ вопіющимъ въ пустынь, важно однако, чтобы наши принципы были извѣстны нашимъ согражданамъ для

Sed la kurantaj fariĝoj en la patrujo de la unuaj Hilelistoj devigas ilin elpaŝi kun sia projekto multe pri frue, ol ili intencis. Nun, kiam ĉio ĉe ni vekigis al nova vivo, kiam la societa konscienco komencas doni signojn de sia ekzistado, kiam aperas espero, ke anstataŭ premantoj kaj prematoj ni eble baldaŭ havos nur „homojn“ kaj „regnanojn“, — nun por ni pli ol por ĉiu alia nacio estas necese fiksi difinitajn politike-religiajn dogmojn, kiuj donus la eblon al ĉiu regnanto de nia diversgenta patrujo vivi en plena paco kun ĉiuj aliaj regnantoj, ne altrudante al ili per rajto de pugno siajn pure familiajn idealojn. En la nuna kriza momento, kiam nia patrujo bezonas ĉiujn siajn fortojn, estas necese enkonduki en la vivon tiajn dogmojn, kiuj permesus al ĉiuj diversgentaj kaj diversreligiaj regnantoj ĉesigi siajn reciprokajn malpacon kaj kalkulojn kaj sincere unuiĝi por la savo de nia komuna patrujo, kiu devas kompreneble fariĝi fine propraĵo de ĉiuj siaj regnantoj kaj ne sole de unu gento aŭ religio. Kvankam la grandega plimulto de niaj samregnantoj estas ankoraŭ tute ne preparita por nia ideo kaj nia voĉo longan tempon ankoraŭ restos voĉo krianta en dezerto, estas tamen grave, ke niaj principoj estu konataj al niaj samregnantoj, por ke tiuj malmultaj, kiuj serĉas intergentan justecon, sciu, en kio ĝi laŭ nia opinio konsistas. Jen estas la kaŭzo, kial la Hilelistoj decidis publikigi siajn dogmojn jam nun kaj proponi al ĉiuj amikoj de intergenta egaleco


того, чтобы тѣ немногіе, которые ищутъ междуплеменной справедливости, знали, въ чемъ она по нашему убѣжденію выражается. Вотъ почему Гиллелисты рѣшили опубликовать свои догматы уже теперь и предложить всѣмъ друзьямъ междуплеменнаго равенства и братства, какъ бы они ни были малочисленны, присоединиться къ нимъ *).

Январь 1906.



ПРЕДВАРИТЕЛЬНОЕ ОБЪЯСНЕНІЕ.

Изложенные ниже догматы Гиллелизма имѣютъ значеніе только принципиальное; окончательная редакція этихъ догматовъ будетъ установлена только въ послѣдствіи, на первомъ всеобщемъ съѣздѣ Гиллелистовъ.



СУЩНОСТЬ ГИЛЛЕЛИЗМА.

Гиллелизмъ есть ученіе, которое, не отрывая человѣка ни отъ его натуральной родины, ни отъ его языка или религіи, даетъ ему возможность избѣгать всякой

*) До основанія центрального органа Гиллелистовъ просимъ одобряющихъ идею Гиллелизма сообщать свой адресъ редакціи той газеты, которая напечатала наше настоящее письмо (Адресъ: Редакція газеты „*Ruslanda Esperantisto*“, С.-Петербургъ, Б. Подъяческая, д. № 24, кв. 12).

kaj frateco, kiel ajn malgrandnombraj ili estas, aliĝi al ili *).

Januaro 1906.



ANTAŬA KLARIGO.

La malsupre donitaj dogmoj de la Hilelismo havas signifon nur principan; la definitiva teksto de tiuj ĉi dogmoj estos fiksita nur poste, en la unua komuna kongreso de la Hilelistoj.



ESENCO DE LA HILELISMO.

La Hilelismo estas instruo, kiu, ne deŝirante la homon de lia natura patrujo, nek de lia lingvo, nek de lia religio, donas al li la eblon eviti ĉian mal-


*) Ĝis la fondo de centra organo hilelista, la aprobantoj de la ideo de Hilelismo estas petataj sendi sian adreson al la redakcio de tiu gazeto, kiu afable publikigis nian nunan leteron. (Adreso: Redakcio de la gazeto „Ruslanda Esperantisto“ S.-Peterburgo, B. Podjaĉeskaja. d. № 24, loĝ. 12).

фальши и противорѣчій въ своихъ національно-религіозныхъ принципахъ и имѣтъ общеніе съ людьми всѣхъ языковъ и религій на почвѣ нейтрально-человѣческой, на началахъ взаимнаго братства, равенства и справедливости.



ОКОНЧАТЕЛЬНАЯ ЦѢЛЬ ГИЛЛЕЛИЗМА *).

Гиллелисты надѣются, что путемъ постоянного общенія на почвѣ нейтральнаго языка и нейтральныхъ религіозныхъ принциповъ и обычаевъ люди мало-по-малу сольются въ одинъ нейтрально-человѣческій народъ, но что это будетъ совершаться постепенно, незамѣтно и безъ всякой ломки.



ДЕКЛАРАЦІЯ ГИЛЛЕЛИСТА.

Когда меня спрашиваютъ, кто я таковъ, каковы мои національныя убѣжденія, религіозные принципы, мои стремленія и идеалы, я отвѣчаю: „Я Гиллелистъ“. Это значитъ, что я человѣкъ, руководящійся слѣдующими догматами:

1.

Я человѣкъ, и для меня существуютъ только идеалы чисто человѣческіе; всякіе

*) Названіе свое Гиллелизмъ получилъ отъ имени древняго Палестинскаго мудреца Гиллея, модифицированный принципъ котораго принятъ въ основу религіи Гиллелистовъ.

verecon kaj kontraŭparolojn en siaj nacia-religiaj principoj kaj komunikiĝadi kun homoj de ĉiuj lingvoj kaj religioj sur fundamento neŭtrale-homa, sur principoj de reciproka frateco, egaleco kaj justeco.



FINA CELO DE LA HILELISMO *).

La Hilelistoj esperas, ke per konstanta reciproka komunikiĝado sur la bazo de neŭtrala lingvo kaj neŭtralaj religiaj principoj kaj moroj la homoj iam kunfandiĝos en unu neŭtrale-homan popolon, sed tio-ĉi fariĝados iom post iom, nerimarkate kaj sen ia rompado.



DEKLARACIO DE HILELISTO.

Kiam oni min demandas, kiu mi estas, kiaj estas miaj naciaj konvinkoj, religiaj principoj, mia celado kaj idealoj mi respondas: „Mi estas Hilelisto“. Tio-ĉi signifas, ke mi estas homo, kiu sin gvidas per la sekvantaj dogmoj:

1.

Mi estas homo, kaj por mi ekzistas nur idealoj pure homaj; ĉiajn idealojn kaj cela-

Rimarko. Sian nomon la Hilelismo ricevis laŭ la nomo de la kantiva Palestina saĝulo Hillel, kies modifikita principo estas akceptita kiel bazo por la religio de la Hilelistoj.

же идеалы и стремленія племенно-національные я рассматриваю только какъ групповой эгоизмъ и человѣконенавистничество, которые раньше или позже должны исчезнуть и исчезновенію которыхъ я долженъ по мѣрѣ возможности содѣйствовать.

2.

Я вѣрую, что всѣ народы равны и я оцѣниваю каждого человѣка только по его личному достоинству и поступкамъ, а не по его происхожденію. Всякое оскорбленіе или преслѣдованіе человѣка за то, что онъ родился отъ другого племени, съ другимъ языкомъ или другой религіей, чѣмъ я, я считаю варварствомъ.

3.

Я вѣрую, что каждая страна принадлежитъ не тому или другому племени, а вполне равноправно всѣмъ своимъ жителямъ, какой бы языкъ или религію они ни имѣли; смѣшиваніе интересовъ страны съ интересами того или другого племени, языка или религіи я считаю остаткомъ варварскихъ временъ, когда существовало только право кулака и меча.

4.

Я вѣрую, что въ своей семейной жизни каждый человѣкъ имѣетъ полное, естественное и неоспоримое право говорить какимъ языкомъ или діалектомъ онъ хочетъ и исповѣдывать какую религію онъ хочетъ, но въ

don gente-naciajn mi rigardas nur kiel grupan egoismon kaj hommalamon, kiuj pli aŭ malpli frue devas malaperi kaj kies malaperon mi devas akceladi laŭ mia povo.

2.

Mi kredas, ke ĉiuj popoloj estas egalaj kaj mi taksas ĉiun homon nur laŭ lia persona valoro kaj agoj, sed ne laŭ lia deveno. Ĉian ofendadon aŭ persekutadon de homo por tio, ke li naskiĝis de alia gento, kun alia lingvo aŭ religio ol mi, mi rigardas kiel barbarecon.

3.

Mi kredas, ke ĉiu lando apartenas ne al tiu aŭ alia gento, sed plene egalrajte al ĉiuj ĝiaj loĝantoj, kian ajn lingvon aŭ religion ili havas; la intermiksadon de la interesoj de lando kun la interesoj de tiu aŭ alia gento, lingvo aŭ religio mi rigardas kiel restaĵon de la tempoj barbaraj, kiam ekzistis nur rajto de pugno kaj glavo.

4.

Mi kredas, ke en sia familia vivo ĉiu homo havas plenan, naturan kaj nedisputeblan rajton paroli kian lingvon aŭ dialekton li volas kaj konfesi kian religion li volas, sed en komuniĝado kun homoj de alia deveno li

общеніи съ людьми иного происхожденія онъ долженъ, на сколько это возможно, употреблять языкъ нейтрально-человѣческой и жить по принципамъ религіи нейтрально-человѣческой. Всякое стремленіе одного человѣка навязывать другимъ людямъ свой языкъ или свою религію я считаю варварствомъ.

5.

Отечествомъ моимъ я называю то государство, въ которомъ я родился или въ которомъ я навсегда поселился. Та часть государства, въ которой я провелъ свое дѣтство или которая населена преимущественно моимъ племенемъ, можетъ быть для меня милѣе всѣхъ другихъ частей; но называть своимъ отечествомъ одинъ кусокъ моего или тѣмъ болѣе чужого государства на томъ основаніи, что тамъ преобладаетъ или когда-то властвовало мое племя, я никогда не долженъ, такъ какъ это не только ведетъ къ вѣчнымъ спорамъ, но было бы противно нравственному закону о безплеменности земли. Если же часть отечества, въ которой я живу, по своему географическому или этнографическому характеру слишкомъ сильно разнится отъ всѣхъ другихъ частей, тогда я во избѣжаніе недоразумѣнія, могу на вопросы объ отечествѣ называть особо ту часть государства, въ которой я живу, но я долженъ тогда называть ее своимъ отечественнымъ краемъ, для того, чтобы было ясно, что я считаю ее не моимъ исключительнымъ

devas, kiom ĝi estas ebla, uzadi lingvon neŭtrale-homan kaj vivi laŭ la principoj de religio neŭtrale-homa. Ĉiun celadon de unu homo altrudi al aliaj homoj sian lingvon aŭ religion mi rigardas kiel barbarecon.

5.

Mia patrujo mi nomas tiun regnon, en kiu mi naskiĝis aŭ en kiu mi por ĉiam enloĝiĝis. Tiu parto de la regno, en kiu mi pasigis mian infanecon, aŭ kiu estas loĝata precipe de mia gento, povas esti por mi pli kara, ol ĉiuj aliaj partoj; sed nomi mia patrujo unu pecon de mia aŭ tiom pli de fremda regno pro tio, ke tie pleje loĝas aŭ iam regis mia gento, mi neniam devas, ĉar tio ĉi ne sole kondukas al konstantaj disputoj, sed ĝi estus ankaŭ kontraŭa al la morala leĝo pri la sengenteco de la tero. Se tiu parto de la patrujo, en kiu mi loĝas, laŭ sia geografia karaktero aŭ laŭ siaj moroj tro multe diferencas de la aliaj partoj, tiam—por eviti malkompreniĝon—mi povas al la demando pri mia patrujo nomi aparte tiun parton de la regno, en kiu mi loĝas, sed mi devas tiam ĝin nomi mia patruja lando, por ke estu klare, ke mi rigardas ĝin ne kiel mian ekskluzivan patrujon, sed nur kiel parton de mia patrujo. Sed nek mian tutan patrujon, nek ĝiajn apartajn partojn mi devas nomi per la nomo de ia gento, sed mi devas ilin nomi nur per nomo neŭtrale geografia, kiel estas farate en ĉiuj plej novaj regnoj; sed se

отечествомъ, а только частью моего отечества. Но ни отечества моего въ цѣлости, ни отдѣльныхъ частей его я не долженъ называть именемъ какого-нибудь племени, а я долженъ называть ихъ только именемъ нейтрально-географическимъ, какъ это дѣлается во всѣхъ новѣйшихъ государствахъ, до тѣхъ же поръ, пока мое государство или край нейтральнаго названія не имѣютъ, я долженъ всегда—по крайней мѣрѣ, въ бесѣдѣ съ гиллелистами—называть мое государство и край гиллелистическимъ именемъ, состоящимъ изъ имени ихъ главнаго города съ прибавленіемъ окончанія „regno“ для цѣлаго отечества, „lando“ для части его.

Примѣры названія странъ: Швейцарія, Бельгія, Австрія, Канада, Мексика, Перу; Петербургрегнія, Паризрегнія; Алжирія, Варсовиландія и т. п.

6.

Патріотизмомъ или служеніемъ своему отечеству я называю только служеніе благу всѣхъ моихъ согражданъ, какого бы происхожденія, языка или религіи они ни были; служеніе же только племеннымъ интересамъ, языку или религіи преобладающаго въ странѣ населенія я никогда патріотизмомъ называть не долженъ. Исходя изъ того принципа, что одни граждане, хотя бы они составляли въ странѣ огромное большинство, не имѣютъ нравственнаго права навязывать свой языкъ или религію другимъ гражданамъ, я долженъ стремиться къ тому, чтобы въ странѣ моей каждая

mia regno aŭ lando ne havas ankoraŭ neŭtralan nomon, mi devas ĉiam — almenaŭ en parolado kun Hilelistoj — nomi mian regnon kaj landon per nomo hilelista, kiu konsistas el la nomo de ilia ĉefa urbo kun la aldono de la finiĝo „regno“ por la tuta patrujo kaj „lando“ por la nomo de ĝia parto.

Ekzemploj: Svisujo, Belgujo, Aŭstrujo, Kanado, Meksiko, Peruo; Peterburgregno, Parizregno; Alĝerio, Varsovilando.

6.

Patriotismo aŭ servado al la patrujo mi nomas nur la servadon al la bono de ĉiuj miaj samregnanoj, de kia ajn deveno, lingvo aŭ religio ili estas; la servadon speciale al la gentaj intereso, lingvo aŭ religio de tiu loĝantaro, kiu en la lando prezentas la plimulton, mi neniam devas nomi patriotismo. Konforme al la principo, ke unuj regnanoj, eĉ se ili prezentas en la lando grandegan plimulton, ne havas moralan rajton altrudi sian lingvon aŭ religion al la aliaj regnanoj, mi devas penadi, ke en mia lando ĉiu gento havu la rajton fondi por siaj membroj lernejojn kaj aliajn instituciojn kun sia lingvo kaj sia religio, se ili tion-ĉi dezi-

народность имѣла право основывать для своихъ членовъ школы и другія учрежденія со своимъ языкомъ и своею религіей, если они этого желаютъ, но чтобы во всѣхъ учрежденіяхъ общественныхъ, не назначенныхъ для одного только племени, господствовалъ только языкъ нейтрально-человѣческой и праздники нейтрально-человѣческіе или государственные. До тѣхъ же поръ, пока достиженіе этого не будетъ возможно, я долженъ стремиться къ тому, чтобы въ странѣ моей существовали школы и другія учрежденія съ языкомъ нейтрально-человѣческимъ для тѣхъ гражданъ, которые не желаютъ или не могутъ пользоваться учрежденіями съ тѣмъ или другимъ племеннымъ языкомъ, а отъ всякой борьбы языковъ или религій между собою за господство я долженъ держать себя въ сторонѣ, ибо это есть только борьба между одной несправедливостью и другою.

7.

Я знаю, что въ тѣхъ странахъ, гдѣ населеніе болѣе или менѣе однородно, оно долгое время не будетъ понимать несправедливости господствованія одного языка или религіи надъ другими и будетъ всѣми силами бороться противъ равноправія всѣхъ религій, а поборниковъ этого равноправія оно будетъ преслѣдовать и забрасывать грязью. Но я никогда не буду смущаться этими преслѣдованіями, помня о томъ, что я борюсь за абсолютную правду и справедливость, что ни одинъ народъ не можетъ

ras, sed ke en ĉiuj publikaj institucioj, ne destinitaj sole por unu gento, regu nur lingvo neŭtrale-homa kaj festoj neŭtrale homaj aŭ regnaj. Tiel longe, kiel la atingo de tio-ĉi estos ne ebla, mi devas penadi, ke en mia lando ekzistu lernejoj kaj aliaj institucioj kun lingvo neŭtrale-homa por tiuj regnantoj, kiuj ne volas aŭ ne povas uzi instituciojn kun tiu aŭ alia genta lingvo, kaj de ĉia reciproka batalado de lingvoj aŭ religioj pro regado mi devas teni min flanke, ĉar ĝi estas nur batalado inter unu maljustaĵo kaj alia.

7.

Mi konscias, ke en tiuj landoj, kie la loĝantaro estas pli-malpli unugenta, ĝi longan tempon ne komprenos la maljustecon de regado de unu lingvo aŭ religio super la aliaj kaj ĝi per ĉiuj fortoj batalados kontraŭ la egalrajtigo de ĉiuj lingvoj kaj religioj, kaj la defendantojn de tiu-ĉi egalrajtigo ĝi persekutados kaj superĵetados per koto. Sed mi neniam konfuziĝos per tiu-ĉi persekutado, memorante, ke mi batalas pro absoluta vero kaj justeco, ke nenia popolo povas scii, kio fariĝos kun ĝi morgaŭ, ke la egalrajtigo de ĉiuj lingvoj kaj religioj

знать, что будетъ съ нимъ завтра, что эмансипація всѣхъ языковъ и религій уничтожитъ поводъ всѣхъ войнъ и раздоровъ между народами, что всякій поступокъ противъ девиза „государство для гражданъ“ и всякое племенное насиліе однихъ гражданъ надъ другими остается насиліемъ, хотя бы оно совершалось огромнымъ большинствомъ надъ исчезающимъ меньшинствомъ, и что прочное счастье человечества возможно только тогда, когда для всѣхъ народовъ и странъ будетъ существовать справедливость, одинаковая и абсолютная, не зависящая ни отъ мѣста, ни отъ времени, ни отъ силы, и когда въ каждомъ государствѣ будутъ только люди и граждане, а не племена.

8.

Народомъ своимъ я называю совокупность всѣхъ людей, населяющихъ мое отечество, какого бы происхожденія, языка или религіи они ни были; но къ имени народа моего я долженъ всегда прибавлять слово „Гиллелистъ“, чтобы указать, что я отношу себя къ народу моему не въ смыслѣ шовинистическомъ. Совокупность же всѣхъ людей, имѣющихъ одинаковое со мною происхожденіе, я называю моимъ племенемъ. Въ бесѣдѣ съ гиллелистами я долженъ избѣгать сбивчивыхъ словъ „народъ“ или „нація“, а вмѣсто нихъ я долженъ употреблять всегда точное гиллелистское выраженіе „regnaparo“ (населеніе одного государства) или „landaparo“ (населеніе одного края). Но ни

forigos la kaŭzon de ĉiuj militoj kaj malpacoj inter la popoloj, ke ĉia ago kontraŭ la devizo „la regno por la regnantoj“ kaj ĉia perfortaĵo de unuj regnantoj kontraŭ aliaj restas ĉiam perfortaĵo, eĉ se ĝi estas farata de grandega plimulto kontraŭ malgrandega malplimulto, kaj ke fortika feliĉo de la homaro estas ebla nur tiam, kiam por ĉiuj popoloj kaj landoj ekzistos justeco egala kaj absoluta, dependanta nek de loko, nek de tempo, nek de forto, kaj kiam en ĉiu regno ekzistos nur homoj kaj regnantoj kaj ne gentoj.

8.

Mia nacio mi nomas la tutecon de ĉiuj homoj, kiuj loĝas mian patrujon, de kia ajn deveno, lingvo aŭ religio ili estas; sed al mia nacia nomo mi devas ĉiam aldoni la vorton „Hilelisto“, por montri, ke mi alkalkulas min al mia nacio ne en senco ŝovinista. La aronde ĉiuj homoj, kiuj havas saman devenon kiel mi, mi nomas mia gento. En parolado kun Hilelistoj mi devas eviti la konfuzajn vortojn „nacio“ aŭ „popolo“ kaj anstataŭ ili mi devas ĉiam uzi la precizajn hilelistan esprimon „regnanaro“ (=loĝantaro de unu regno) aŭ „landanaro“ (=loĝantaro de unu lando). Sed nek mian regnanaron, nek mian landanaron mi devas nomi per la nomo de ia gento, mi devas ĉiam nomi ilin — almenaŭ

моего „regnanaro“, ни моего „landanaro“ я не долженъ никогда называть именемъ какого нибудь племени, и только — по крайней мѣрѣ въ бесѣдѣ съ гиллелистами — нейтрально-географическимъ именемъ моего государства или края. Если же собесѣдникъ мой желаетъ знать не только къ какой политическо-географической, но также и къ какой этнографической группѣ я принадлежу, тогда я отдѣльно называю ему мое племя, мой языкъ, мою религію и т. п.

Примѣры: Швейцарскій гиллелистъ, Петербургрегнійскій гиллелистъ, Варсовиландскій гиллелистъ.

9.

Языкомъ своимъ я называю тотъ языкъ, которымъ я лично лучше всего владѣю и охотнѣе всего говорю; но къ его названію я долженъ всегда прибавлять слово „гиллелистическій“ для того, чтобы указать, что своего языка я не считаю своимъ кумиромъ и что идеаломъ моимъ есть языкъ нейтрально-человѣческой. Во всѣхъ собраніяхъ гиллелистическихъ, а по мѣрѣ возможности также и во всѣхъ частныхъ сношеніяхъ съ гиллелистами я долженъ употреблять языкъ гиллелистическій. Въ семейной жизни я могу употреблять какой языкъ мнѣ удобно, но я долженъ называть его не своимъ національнымъ, а только своимъ языкомъ семейнымъ. На вопросъ же о моемъ языкѣ національномъ я долженъ отвѣтить: „существованія національныхъ языковъ я не признаю, такъ какъ

en parolado kun Hilelistoj — per la neŭtrale-geografia nomo de mia regno aŭ lando. Se mia interparolanto deziras scii ne sole al kiu politike-geografia, sed ankaŭ al kiu etnografia grupo mi apartenas, tiam mi aparte nomas al limian genton, lingvon, religion k. t. p.

Ekzemploj; Sviso-Hilelisto, Peterburg-regna Hilelisto, Varsovilanda Hilelisto.

9.

Mia lingvo mi nomas tiun lingvon, kiun mi persone plej bone scias kaj plej volonte parolas, sed al la nomo de tiu-ĉi lingvo mi devas ĉiam aldoni la vorton „hilelista“, por montri, ke mian lingvon mi ne rigardas kiel mian idolon kaj ke mia idealo estas lingvo neŭtrale-homa. En ĉiuj hilelistaj kunvenoj kaj, kiom eble, ankaŭ en ĉiuj privataj komunikiĝoj kun Hilelistoj mi devas uzadi la lingvon hilelistan. En mia familia vivo mi povas uzadi kiun lingvon mi volas, sed mi devas ĝin nomi ne mia nacia, sed nur mia lingvo familia. Kiam oni demandas min pri mia lingvo nacia, mi devas respondi: „la ekzistadon de lingvoj naciaj mi ne konfesas, ĉar ĉiu nacio nuntempa parolas per multaj lingvoj; sed mia lingvo genta estas jena (nome tiu lingvo aŭ dialekto, kiun en mia patrujo parolas la plimulto de

каждая нація говоритъ многими языками; племеннымъ же языкомъ я считаю языкъ такой-то (именно тотъ языкъ или нарѣчіе, которымъ въ моемъ отечествѣ говоритъ большинство моего племени, хотя бы я самъ этимъ языкомъ даже совершенно не владѣлъ).

Примѣчаніе. Такъ какъ въ настоящее время есть только одинъ нейтральный языкъ, а именно Эсперанто, то гиллелисты принимаютъ именно его; но они сохраняютъ за собою право замѣнить его въ послѣдствіи инымъ языкомъ, еслибы это оказалось нужнымъ.

10.

Религіей моею я называю ту религію, въ которой я родился, или къ которой я официально приписанъ; но къ имени ея я долженъ прибавлять слово „гиллелистическая“, чтобы указать, что исповѣдую ее по религіознымъ принципамъ гиллелизма, которые состоятъ въ слѣдующемъ:

а) Подъ словомъ „Богъ“ я подразумѣваю ту непонятную уму моему Высшую Силу, которая управляетъ міромъ и сущность которой я имѣю право толковать себѣ такъ, какъ диктуетъ мнѣ мой разумъ и сердце.

б) Основнымъ закономъ моею религіи я считаю правило „поступай съ другимъ такъ, какъ ты хотѣлъ бы, чтобы другіе поступали съ тобою, и прислушивайся всегда къ голосу твоей совѣсти“; все остальное въ моею религіи я считаю только легендами или религіозными обычаями, которые

mia gento, se eĉ mi mem tute ne posedus tiun-ĉi lingvon).

Rimarko. Ĉar en la nuna tempo ekzistas nur unu neŭtrala lingvo, nome Esperanto, tial la Hilelistoj akceptas ĝuste ĝin; tamen ili rezervas al si la rajton anstataŭigi iam poste tiun-ĉi lingvon per ia alia lingvo, se tio-ĉi montriĝos utila.

10.

Mia religio mi nomas tiun religion, en kiu mi naskiĝis, aŭ al kiu mi estas oficiale alskribita; sed al ĝia nomo mi devas ĉiam aldoni la nomon „hilelista“, por montri, ke mi konfesas ĝin laŭ la religiaj principoj de la Hilelismo, kiu konsistas en jeno:

a) Sub la nomo „Dio“ mi komprenas tiun al mi nekompreneblan plej altan Forton, kiu regas la mondon kaj kies esencon mi havas la rajton klarigi al mi tiel, kiel diktas al mi mia saĝo kaj koro.

b) Kiel fundamentan leĝon de mia religio mi rigardas la regulon „agu kun aliaj tiel, kiel vi deziras ke aliaj agu kun vi, kaj aŭskultu ĉiam la voĉon de via konscienco“; ĉion alian en mia religio mi rigardas nur kiel legendojn aŭ kiel religiajn morojn, kiuj estas enkondukitaj de homoj, por enporti en la vi-

установлены людьми для того, чтобы внести въ жизнь опредѣленную житейскую программу и духовную темноту, и исполненіе или неисполненіе которыхъ зависитъ отъ моего личнаго желанія.

с) Я сознаю, что каждый человекъ принадлежитъ къ той или другой традиціонной религіи не потому, что она соотвѣтствуетъ его личнымъ убѣжденіямъ, а только потому, что онъ въ ней родился, и что сущность всѣхъ религій одна и та же, а онѣ отличаются другъ отъ друга только легендами и обычаями, не зависящими отъ личнаго выбора человека. Я сознаю поэтому, что никого нельзя ни хвалить, ни порицать за его традиціонную религію и что добрые или злые поступки человека зависятъ не отъ его религіи, а только отъ него самого и отъ обстоятельствъ его жизни. А такъ какъ религіозные обычаи, которые составляютъ единственное отличіе одной религіи отъ другой и единственную причину религіозной вражды между людьми, установлены не Богомъ, а людьми, то я долженъ содѣйствовать тому, чтобы путемъ постояннаго общенія между собою гиллелистовъ различныхъ религій разнообразныя религіозныя обычаи всѣхъ гиллелистовъ мало по малу уступали мѣсто обычаямъ общимъ, нейтрально-человѣческимъ.

11.

Когда въ моемъ городѣ будетъ основанъ храмъ гиллелистовъ, я долженъ какъ можно чаще посѣщать его, чтобы братски сходиться тамъ съ гиллелистами другихъ

von difinitan programon kaj spiritan varmon, kaj kies plenumado aŭ neplenumado dependas de mia persona deziro.

c) Mi konscias, ke ĉiu homo apartenas al tiu aŭ alia tradicia religio ne tial, ke ĝi la plej multe respondas al liaj personaj konvinkoj, sed nur tial, ke li en ĝi naskiĝis, kaj ke la esenco de ĉiuj religioj estas la sama, kaj ili distingiĝas unu de alia nur per legendoj kaj moroj, kiuj ne dependas de persona elekto de homo. Tial mi konscias, ke oni nenion povas laŭdi nek mallaŭdi por lia tradicia religio kaj ke bonaj aŭ malbonaj agoj de homo dependas ne de lia religio, sed nur de li mem kaj de la cirkonstancoj de lia vivo. Kaj ĉar la religiaj moroj, kiuj prezentas la solan diferencon inter unu religio kaj alia kaj la solan kaŭzon de religia malamo inter la homoj, estas donitaj ne de Dio, sed de homoj, tial mi devas kunhelpi al tio, ke per konstanta reciproka komuniĝado de la hilelistoj de diversa religioj la diversformaj religiaj moroj de ĉiuj hilelistoj iom post iom cedu la lokon al moroj komunaj, neŭtrale-homaj.

11.

Kiam en mia urbo estos fondita templo hilelista, mi devas kiel eble pli ofte vizitadi ĝin, por frate kunvenadi tie kun hilelistoj de aliaj religioj, ellaboradi kune kun ili morojn kaj

религій, виробувати вмѣстѣ съ ними обычаи и праздники нейтрально-человѣческіе и такимъ образомъ содѣйствовать постепенной выработкѣ философски чистой, но вмѣстѣ съ тѣмъ прекрасной, поэтической и теплою жизнью - регулирующею религію обще-человѣческой, которую родители смогутъ безъ лицемѣрія передати своимъ дѣтямъ. Въ храмѣ гиллелистовъ я буду слушати произведенія великихъ учителей челоуѣчества о жизни и смерти и объ отношеніи нашего „я“ къ вселенной и вѣчности, философско-этическія бесѣды, возвышающіе и облагораживающіе гимны и т. п. Храмъ этотъ долженъ воспитувати юношей борцами за правду, добро, справедливость, и общечеловѣческое братство, виробувати въ нихъ любовь къ честному труду и отвращеніе къ фразерству и ко всякимъ низкимъ порокамъ; храмъ этотъ долженъ давати отраду старцамъ, успокоеніе страдающимъ, давати возможность искупати свою вину тѣмъ, у кого совѣсть чѣмъ нибудь обременена и т. п. До тѣхъ же поръ, пока въ городѣ моемъ нѣтъ Гиллелистскаго храма, какъ можно чаще сходиться на общія бесѣды съ другими гиллелистами моего города, а за неимѣніемъ таковыхъ сообщаться письменно съ гиллелистами другихъ городовъ.

12.

Гиллелистомъ я считаю каждого челоуѣка, кто подписалъ „Декларацию Гиллелиста“ и приписался къ одному изъ существующихъ Гиллелистическихъ храмовъ или кружковъ.



festojn neŭtrale-homajn kaj tiamaniere kun—
 helpli al la iom-post-ioma ellaboriĝo de filo-
 zofie pura, sed samtempe bela, poezia kaj var-
 ma vivo-reguliga religio komune-homa, kiun
 gepatroj povos sen hipokriteco transdoni al
 siaj infanoj. En la templo hilelista mi aŭskulta-
 dos la verkojn de la grandaj instruintoj de la
 homaro pri la vivo kaj morto kaj pri la rilato
 de nia „mi“ al la universo kaj al la eter-
 neco, filozofie-etikajn interparolojn, altigajn kaj
 nobligajn himnojn k. t. p. Tiu-ĉi templo
 devas edukadi la junulojn kiel batalantojn
 por la vero, bono, justeco kaj ĉiuhoma frateco,
 ellaboradi en ili amon al honesta laboro kaj
 abomenon por frazisteco kaj por ĉiuj malno-
 blaj malvirtoj; tiu-ĉi templo devas donadi
 spiritan ripozon al la maljunuloj, konsolon al
 la suferantoj, doni la eblon senŝarĝigi sian
 konsciencon al tiuj, ĉe kiuj ĝi estas ŝarĝita
 per io k. t. p. Tiel longe kiel en mia urbo
 ne ekzistas templo hilelista, mi devas kiel
 eble plej ofte kunvenadi por komunaj inter-
 paroladoj kun aliaj Hilelistoj de mia urbo,
 kaj se tiaj ne ekzistas, mi devas komunikiĝadi
 letere kun Hilelistoj de aliaj urboj.

12.

Hilelisto mi nomas ĉiun homon, kiu subskri-
 bis la „Deklaracion de Hilelisto“ kaj alskribi-
 ĝis al iu el la ekzistantaj hilelistaj temploj aŭ
 rondetoj.

„Ruslanda Esperantisto“

Oficiala organo de S-to „Espero“.


Журналъ „Ruslanda Esperantisto“ получають всѣ члены О-ва „Эсперо“ бесплатно. Членомъ О-ва „Эсперо“ можетъ быть всякое лицо, сочувствующее идеѣ международнаго языка и знакомое съ языкомъ Эсперанто, безъ различія пола и возраста, сдѣлавшее годовой членскій взносъ въ размѣрѣ **3** руб.

Адресъ О-ва „Эсперо“ и Редакціи „R. E.“:
**С.-ПЕТЕРБУРГЪ, Большая Подъяческая ул.,
д. № 24.**

Ĵurnalon „Ruslanda Esperantisto“ ricevadas ĉiuj membroj de S-to „Espero“ senpage. Membro de S-to „Espero“ povas esti ĉiu persono, aprobanta ideon de internacia lingvo kaj konata kun lingvo Esperanto, egale de ĉia sekso kaj aĝo, farinta jaran membran enpagon en kvanto de **3** rubloj (=7 fr. 50 cent.=6 markoj).

Adreso de S-to „Espero“ kaj de Redakcio de „R. E.“:

**Ruslando, St.-PETERBURGO, Bolŝ. Podjaĉe-
skaja str., d. 24, loĝ. 12.**



הספריה הלאומית

S 21 C 7257

Zamenhof, Ludwik Lazar,

Dogmoj de hilelismo /

C.1



2189942-10

W-X

S

21
C
7257

Red ribbon